

## & La filo de l' bataliono:

< Rekante 15 el 31 batoj por strofo, entute 372 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio de Nudpieda knabo, Norda Kantaro #4740, kaj nova rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:4> (#4740: < Marŝo, :4> (SoSo Mi3Mi MiSo DoDo; LaLa So3So SoSo ReRe; FaFa TI3TI TIRe SO3SO SoSo Mi3Mi MiSo DoDo

(#Rekantaĵe: ; SoSo Mi3Mi MiSo DoDo; DoDo Fa3Fa FaLa dodo; TiLa So TiLa SoSo FaTI Do o

)×12 )+

### (&Strofoj:

'1 /Sub Afrik-ĉieloj brulaj, ; meze de l' plej negra gento ; Sole estis blankhaŭtulaj ; La soldatoj de taĉmento,

(×:; **kaj bezonas mi en vivo ; por amora efektivo ; kunulinon kun varma mola sin'**.)

'2 Kaj en tiu regiono ; La solsola blankulino ; Estis ĉe l' bataliono ; De l' major' kuiristino. ....

'3 La majoro, vigla viro, ; Ŝatis ŝin pro spertaj konoj ; En la arto de l' kuro ; Kaj... de l' homaj am-bezonoj... ....

'4 Sed sekrete ankaŭ uzis ; Ŝin la juna leŭtenanto, ; Ĉar neniam ŝi rifuzis ; Sian koron al petanto! ....

'5 Kaj havante superflon ; Ofte da temperamento ; Ŝi konsentis rendezuon ; Ankaŭ al la ĉefserĝento! ....

'6 Ĉar ŝi estis tre diskreta, ; Ĉiu el l' amantoj kredis, ; Ke dum rendezu' sekreta ; Li tutsola ŝin posedis... ....

'7 Tial, foje, kiam temis ; Pri videbla gravedeco, ; Kulpkonscie ĉiu tremis ; Pro la timo de patreco... ....

'8 Kaj ŝi lerte ekspluatis ; Ruz-minace la fatalon, ; Ĉar neniu multe ŝatis ; Mokan ridon nek skandalon! ....

'9 Efektive la majoro ; Tuj aĉetis la silenton, ; Li je ŝia solfavoro ; Skribis sian testamenton! ....

'10 Pagis similmaniere ; Leŭtenanto la silenton, ; Promesante surpapere ; Dum dek jaroj altan renton. ....

'11 La malriĉa ĉefserĝento ; Faris kion ŝi proponis, ; Por ke daŭru la silento, ; Li... edziĝpromeson donis! ....

### ,& Dua:

'12 Multe ridis la soldatoj, ; Kiu konis la sekreton, ; Ĉar ŝi naskis post monatoj ; ... Tute nigran negruleton! ....)